Universala Esperanto-Asocio
AKTIVULA MATURIGO
Estrara Subteamo: MOVADO

Estrara Komuniko: EKO 2015-46 sendita el Greziljono, la 28an de oktobro.


# Jam duonvoje tra AMO 15 – du etapoj el kvar

La dekkvina Seminario Pri Aktivula Maturigo (SPAMO 15) bone progresas en la Kulturdomo Greziljono kun eta sed vigla partoprenantaro, ĉiuj Francoj. Verŝajne temas pri la unua seminario kun ĉiuj seminarianoj el la sama lando. Laŭ la temo ‘Grimpi la monton granitan’, ĉiu ricevis inviton entrepreni la kvar-etapan ekspedicion supren al la pinto de tiu malfacila monto kiu nomiĝas ‘altiri novajn adeptojn.’

La unua tago temis pri interkonatiĝo, unue ĝenerale, pere de intervjuoj, tiel ke ĉiu prezentis ne sin mem sed sian partneron. Poste oni esploris pri la kapabloj kaj interesoj de la homoj rilate al la seminaria temo. Sekve, la unua tago estis pasigita ĉe la montopieda ‘baz-tendaro’.

La grimpado ekis, ĝis la tendaro de la unua etapo, kun la temo: ‘Kiel trafe informi pri Esperanto’. Unue la seminarianoj ricevis la taskon listigi la plej utilajn mesaĝojn, kiujn ni volas peri. Ni havas liston de naŭ mesaĝoj, sed ĝi bezonas ankoraŭ grupan poluron.

Vespere, la seminarianoj kune kun aliaj kursanoj rigardis vidbendon el la serio TED pri varbtaktikoj, laŭ la ideoj de Simon Sinek. Tiun vidbendon, angle parolita kun subtitoloj en Esperanto, ni uzis en AMO 11 en Svedio. Lia ĉefa tezo estas, ke oni klarigu unue (kaj ne laste aŭ neniom) KIAL bonas produkto, servo aŭ ideo, kaj nur poste KIEL ĝi funkcias, kaj KIO ĝi estas.




Poste ni esploris la liver-meĥanismojn por niaj mesaĝoj. Ni dediĉis malmultan tempon al la tradiciaj vojoj (afiŝoj, flugfolioj, budoj, prelegoj…) ĉar ili estas konataj.



Juna seminariano Alexandre Andre ricevis horon prezenti al ni modernajn komunikrimedojn: retejojn, mesaĝilojn Guglo, Firefox, sociajn retejojn Utube, Facebook, Ipernity, Twitter, Redit k.a. Laŭ la abunda notado kaj la demandoj (‘literumu al ni tiun ret-adreson!’) klaras, ke multaj seminari-anoj ne estis klare informitaj kaj eksciis novaĵojn.

Foto: Philippe

Fine de la tago venis propono, ke ni ne nur listigu niajn optimumajn varbajn mesaĝojn, sed ankaŭ eksdatajn aŭ malkonvenajn mesaĝojn. Tuj ni akceptis la proponon, sub la kondiĉo, ke ni samtempe esploru kiel pli pozitive aŭ utile trakti tiujn temojn. Pluraj seminarianoj rakontis pri antaŭjuĝoj aŭ negativaj prijuĝoj, kiujn ili renkontis, kaj ni diskutis (same kiel en AMO 5 en Italio) kiel trakti tiujn bedaŭrindajn opiniojn pri la lingvo. Jen la rezultoj:

| **Argumentoj por eviti** | **Prefera aliro aŭ vortumo** |
|---|---|
| Simpla lingvo, facila lingvo | Fascina, vivanta, alirebla lingvo. Efike lernebla ĝis uzeblo.<br>Mallonge aŭdigu, vidigu la lingvon en kunteksto kiu helpas komprenon. |
| Kontraŭulo al la angla. | Por komunika justeco.<br>Alisepca alternativo al la angla -- aŭ aliaj lingvoj |
| Ilo por vojaĝi senpage. | Riĉiga vojaĝilo (spirite, kulture)<br>Moderkoste kaj aŭtentike vojaĝu. |
| Lingvo -mortiganto. “Dua lingvo por ĉiu” | Lingva protektanto. Alianculo por parolkomunumoj de malpli parolataj kaj minacataj lingvoj. Por multlingva mondo kaj lingvaj rajtoj. |
| Lingvo kreita en 1887, vivo de Zamenhof * | Tio ne ĉefrolu – ne estu komencpunkto. Emfazu: vivanta, uzata, kompleta sed evoluanta lingvo. Se rakonti historion, eku de la nuna kaj reiru al la komenco. |
| Ne prezentu nin sektece, zelote. | Ĉe homoj, kiuj haltas ĉe budo, dialogu por eltrovi iliajn interesiĝojn, dubojn, demandojn kaj ekiru de tiu punkto. |

**  Se mencii la historion, emfazu la rolon de la Fundamento, alivorte, la formiga fazo de la lingvo delonge pasis – ĝi ne estas libera sabloludejo por reformemuloj aŭ ‘bonigantoj’.*

Fine de la dua etapo, ni traktis la temon de kursa starigo kaj konigo. Tion ni faris per la tekniko ‘Ses kafejoj’ (lernita el AMO 10 en Italio). Pro spacomanko ni konstruis nur kvin kafejojn, nome, kvin grandajn paperfoliojn, ĉiu kiu unu demando. Seminarianoj libere vagis, vizitis kaj revizitis kafejojn, skribis opiniojn kaj ideojn, kaj je reveno povis reagi al la komentoj de aliaj vizitintoj.

Pri etapoj tri kaj kvar ni raportos en seminarifina komuniko.



“En kafej’ numero kvar…” Foto: Alex Andre.

## TORPEDO refoje trafis la celon

La dekan fojon okazis la Tradicia Oktobra Renkontiĝo Pedagogia (mallonge: TORPEDo) en Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo. La ĉefa celo estis instrukapabligo: lertigi instruemulojn kaj ekipi ilin per scio pri taŭgaj metodoj, didaktikaj konsiloj, instrumaterialoj, helpiloj, ludoj, ktp. por efika instruado de Esperanto ĉu en lernejoj aŭ movadaj kursoj. La faka programo realiĝis en metieja formo por individua aŭ et-grupa taskosolvado, diskutado, spertinterŝanĝo. La trejnadon helpis la atingo de faka kaj apoga literaturo en la biblioteko de la Esperanto-Centro.

Por informoj pri la datoj de trejnsesioj en 2016, iru al: http://esperanto-urbo.de

## Raportu viajn kursojn al <edukado.net>!

Nun estas la sezono de kursa starigo en multaj landoj. La oficiala registrejo de tiuj kursoj por UEA kaj ILEI estas la retejo <edukado.net> kie per interaktivaj mapoj kaj tabeloj, eblas akiri bonan superrigardon. Sed la nuna enhavo ege modestas: Laŭ la registrado funkcias momente 23 movadaj kaj 8 lernejaj kursoj en la mondo. Espereble la vera situacio estas multe pli bona. Skribas katalin Kovats: 'Se oni ne raportas pri sia agado, ni ne povas referenci al la kursoj, nek pruvi, ke ja Esperanto estas instruata en multaj lokoj en la mondo'. UEA kaj ILEI petas ĉiujn registri siajn kursojn por ke ni havu tutmondan superrigardon pri la instrua situacio.

Legu pli ĉe la paĝo: http://edukado.net/novajhoj?id=575

Pri la fino de AMO 15, pri la nova revuo 'Balkana Verda Stelo' kaj aliaj temoj en sekvaj komunikoj.

Vortoj: 840

La seminarianoj de  AMO 15 antaŭ la kastelo en Greziljono



Foto: Alexandre Andre

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Pli malnovajn komunikojn: iru al: http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...

PDF kreita de Nuance Power PDF.

,